

& Respondo:

< Rekante 31 el 62 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Stanislav Schulhof (Per espero al despero, Pardubice 1910). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:62> (

/LaLa mimi mire doTi LaLa; LaLa lala laso fami rere; mifa mimi mire doTi LaLa;
TiTi mimi mire doTi LaLa; LaLa lala laso fami refa; miTi mimi TiTi doTi Si La;

(#Rekantaĵe: Lami mi mire dolTi La; La lala laso falmi re; mifa mi mire doTi La; Ti
mimi mire doTi La; La lala laso falmi relfa; mifa mi mire dolTi La a)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Vi deziras, sinjorino mia, ; scii ion
tute sen vualo ; pri la vivo en rondeto
nia, ; ĝiaj membroj kaj pri nia lando, ;
pri la esperanta propagando ; kaj pri nia
kor' kaj idealo.

(×: **Svingu alte la ma2nojn ; karaj
samidea2noj ; Ĉeno jen estas nia
rond' ; ekster ĝi la ĥaosa mond' ;
Karaj samidea2noj ; svingu alte la
ma2nojn.**)

'2 Jen respondo al via demando. ;
Kvankam nin dividas vasta maro, ;
kvankam malproksima nia lando, ;
tamen samaj estas niaj koroj, ; tute
samaj ankaŭ la doloroj; kaj por niaj
celoj sama baro.

'3 Tute samaj estas niaj homoj ; kaj ni
havas tute saman vidon. ; Diferencas
eble niaj domoj, ; eble uzas ankaŭ
fremdan formon ; la patrino, se ŝi en la
dormon ; lulas sian malgrandetan idon.

.....

'4 Eble fremda estas nia vesto, ; niaj
veturiloj galopantaj, ; sed mi pensas, ke
ni en la resto, ; kvankam strangaj estas
niaj nomoj, ; tamen estas tute samaj
homoj, ; ĉiam trompitaj kaj esperantaj.

.....

'5 Kaj mi pensas ankaŭ, ke egale ; kiel
ĉe vi envi' ĉion pestas, ; homon homo
batas neniale; nur en nia esperanta
svarmo ; nin kunigas speciala varmo ; -
ĉar ni ĝis nun tre malmultaj estas.)